

## La vagonaro

I

Ĝis la lasta momento mi ne kredis je mia forveturo en malproksiman Orienton. La konstanta akompanado de kolegoj tiel kutimigis min al la ĉeesto en stacidomo fervoja, ke eĉ nun sajnis al mi, ke denove mi akompanas miajn kolegojn, des pli ke kune kun mi preparis sin al forveturo ankaŭ du aliaj kolegoj.

La veran efektivecon mi eksentis nur kiam post longa adiaŭado kun parencoj kaj konatuloj mi enpasis la vagonon.

Lasta sonoro. Lasta daŭra ekkrio de adiaŭ. La vagonaro malrapide komencis elŝiradi nin el la brakoj de nia hejma urbo, el vivaj hejmaj rememoroj. Longan tempon alnajligita al fenestro mi trapikis per mia rigardo ĉiujn detalojn, penante forĝi en la memoro ĉiujn bagatelaĵojn, kiujn en aliaj kondiĉoj mi sendube traveturus seninterese. La vespero estis belega. La luno preskaŭ en pleneco riĉe lumigis la teron kovritan de malŝarĝa neĝa kovrilo, kiu per mil ŝanĝantaj briletoj respondis al la afabla, trankvila rideto de l'luno. La aero estis neordinare pura, la vagonaro rapide iris en malproksimajn spacojn kvazaŭ volus elŝiri nin el la mezaĵo, kun kiu kvazaŭ ĉeno ligis nin ĉiu penso kaj freŝaj memoroj.

Ni trapasis la ĉirkaŭaĵojn de Varsovio.

En la luma brilo dissterniĝis antaŭ niaj okuloj senfino da kampoj kaj nudaj interspacoj. Malrapide forŝirata de la rememoroj je hejmo, mi komencis kontraŭvole revii pri la plej proksima estonteco.

Per forto elkaptitajn el nia ĉiutaga vivo, rapide forportis nin la sorto en la malproksimegan angulon de l'tero al neniu el ni bezona, sur la pecon da tero, en kiu sendube neniam starus nia piedo, se la sensatiĝema avido homa volus kvietigi siajn sangavidajn instinktojn.

De dek monatoj daŭras jam terura, sovaĝa idola oferado al moloko de l'milito : miloj da homoj elŝiritaj per senkompatema mano el siaj karaj mezaĵoj iras trapiki siajn fratojn por fine mem pereii de fratmortiganta mano! Miloj da homoj sub standardo de Dio iras verŝadi per riveroj la sangon de siaj proksimuloj, semi la pereon kaj neniigi la revojn, detruii la vivon de tutaj familioj, forsiri batantajn je amo kaj revoj korojn.

La homa hipokrizio aldonas al ĉi-tiu sovaĝa tranĉado la formon de l'sankta afero. La kunbatalantoj petas Dion per solenaj preĝoj pri la venko, pri la sukceso en siaj mortigaj sangaj krimoj : La estroj ĉirkaŭigas sin de sanktaj pentraĵoj. Antaŭ ĉiu batalo la pastroj traverŝas per si la Dian benon sur ĉi tiuj, kiuj tuj iros verŝi la sangon de iliaj fratoj. Eĉ kuracistoj, kies ĉefa tasko en la milito devas esti la malgrandigo de doloroj kaj malmultigo de mortoferoj, kontraŭvole fariĝas sanga ilo en la manoj de batalantoj, kiuj sin servas je ni por la rebonigo de la difektita materialo milita el korpo homa. Bela kaj nobla nia tasko fariĝas do en tiu ĉi sovaĝa orgio, unu ĉenero en la granda ĉeno, kiu en sian mortigan amplekson kaptas de tempo al tempo senkulpajn amasojn de l'homaro. La pensoj unu la aliajn puŝis en mia cerbo. Malgajaj ne de mia propra flanko, malgajaj de ilia malluma enhavo, tiel klara kaj tiel nekomprenebla de tiuj en la manoj de kiuj restas nun la potenco sur multaj miloj da homaj vivoj...

Ni haltiĝis en la plej proksima stacio.

Amaseto da homoj, kiujn mi ekvidis el la fenestro, forpuŝis por momento la vicon da trudaj pensoj.

Mi enpasis la vagonkupeon.

En malluma angulo sidis apogante sin sur la amaso en senordo ĵetitaj vojaĝobjektoj unu el la kolegoj kune kun mi alvokitaj al la milito. Li forlasis en Varsovio junan edzinon, dekelkjaran, malfacile akiritan praktikon, vicon da revoj pri la vivo, kiu nur en la lasta tempo komencis sin por li efektive. Oni alvokis lin en la regimenton por vico da malgajaj ŝarĝaj provoj kiel atestonton kaj eble kunhelponton en teruraj fradmortigantaj krimoj. La tria kolego per sia humoro tutigis la malgajan harmonian trion de nia kupeo. Mi ne kuraĝis kaj ne volis dispeli la malĝojon de miaj kolegoj, kvankam mi mem kvietigis iom la unuajn impresojn kaj paciĝis kun la severa efektiveco.

Mi denove eniris la koridoron al la fenestro.

La vagonaro ins unutone, ekbatadante kvazaŭ horloĝo, iafoje ekpuŝante aŭ subite balancante la vagonon.

La ekĝemoj de la lokomotivo kiujn konstante akompanadis la tentado de l'fenestroj aldonis al la vespera kvieteco malgajan impreson, kiun pligrandigis ankaŭ la mallumo de nia vagono avare lumigata de unu kandelo.

Ni trapasis jam la ĉirkaŭaĵon riĉe kovritan de l'neĝo.

Apudvojaj arboj en la lumo de l'luna nokto staris kovritaj de blanka vualo dormigantaj de l'facila vento.

Unu post alia forkuris antaŭ ni lumetoj lanternaj. Ankoraŭ longe mi rigardis en malproksimegon nenion jam pensanta, sole per lacaj okuloj admiranta la belecon de l'luma vintra nokto.

Fine lacigita ni revenis en la kupeon.

La kolegoj jam laboris pri ordigo de siaj objektoj. Komencis la parolado kaj baldaŭ ni revenis al nia ĉiutaga humoro, preskaŭ tute forgesinte la lastajn en Varsovio kaj la unuajn en nia nova vivo impresojn.

## II

La vojon de Moskvo gis Irkutsko ni traveturis en rapida vagonaro. La unuan parton de l'vojo, akompanataj de belega vetero, ni trapasis en tre agrabla societo da kelkaj novaj kolegoj kaj simpatiaj sinjorinoj.

La tagoj forflugis tre agrable kaj tiel rapide, ke ni klare sentis, ke la tago fariĝas iom post iom pli mallonga. La diferenco de l'tempo Varsovia estis jam 3 horoj. La suno leviĝis ĉiutage pli frue, kaj tiamaniere nia nokta ripozo mallongiĝis.

En tria tago de nia vojago en tiu vagonaro, ni trapasis la montojn Uralajn. Nia vagonaro jam la tutan nokton tranĉadis la montojn, kiam ni vekiĝis matene. En la lumo de l'ridetanta suno montriĝis al ni la bela panoramo. La flankoj de l'montoj sin tranĉis reciproke en arta senordo. La suproj kovritaj de densa arbaro, kvazaŭ haregaro, faris impreson de kiresitaj turegoj; aliaj kovritaj de neĝo montriĝis al nia imago kvazaŭ grandeguloj kun blanka fela ĉapo. Amaso da stonegoj en la plej mirindaj formoj rapide traflugis antaŭ la fenestroj de nia vagonaro. Sur iliaj flankoj tie ĉi kaj tie, kvazaŭ birdaj nestoj, pendis mizeraj vilaĝetoj.

La spacego, kiu disterniĝis antaŭ niaj okuloj el la pli altaj lokoj, estis tiel granda, ke eĉ la penso mem premiĝis antaŭ ĝia grandego, kaj ĉie oni vidis la mankon de l'homa vivo. Grandegaj riĉaĵoj kuŝas en profundaĵoj je dormo eterna, sen espero, ke iam mano homa lumigos iliajn tombojn per sunaj radioj. Sur tuta ĉi tiu senfino de l'tero, la vivo homa trapasis nur per mallarĝa rubando fervoja. Ekster ĝi regas preskaŭ plena morto. Kiom da faroj, generacioj, energio oni povus oferi ĉi tie sen guto sanga; per prudenta laboro oni atingus

milfoje pli grandajn trezorojn ol taŭgas tuta Mandĵurujo por kiu nun sence oni verŝas tiom da sango kaj detruas tiom da forto kaj riĉo popola!

Nia vagonaro rapide rampadis sur nudaj flankoj de l'montoj, spirante malfacile kaj kriegante, kvazaŭ ĝi volus turni nian atenton al la grandegaj ĉirkaŭaĵoj, kiujn ĝi trapasis nun tiel kuraĝe kaj kiuj antaŭ kelkaj jaroj staris kvazaŭ fortega muro de l'naturato inter du partoj de l'mondo.

Tutan tagon ni trapasis ankoraŭ montojn Uralajn, ĝis fine ni eniris Azion.

Sovaĝa naturo de Azio, pri kiu ni tiom aŭdis, preparis por nia unua renkonto surprizon. Kiam ni vekigis la sekvintan tagon, la gajaj radioj de l'suno ne enrigardis jam kun rideto en nian vagonon. La fenestroj estis tute blovigataj de neĝo. Ĉirkaŭe kriegis sovaĝa ventego, kiu sufokis malesperajn ekĝemojn de nia lokomotivo. La movo fariĝis iom post iom pli malrapida. Ni sentis, kiel nia fajrospiranta ĉevalo penege batalas kun la neĝa blovado, kiu volante puni la kuraĝulon, kun sovaĝa kriego batadas ĝian bruston, penante puŝi nin for de la vojo.

Nebuloj da neĝo batadis kun krako niajn fenestrojn. Ni haltigadis pli kaj pli ofte, pli kaj pli longe, ĝis fine en unu loko ni devis atendi du horojn, ĉar antaŭ ni iranta vagonaro enfosigis en neĝon kaj jam de kelkaj horoj oni laboris je ĝia elfosiĝo. Uzante la okazon, mi kuraĝis forlasi la vagonon por ekrigardi la pejzagon.

Nebuloj de polvigita neĝo ekbatis min kun terura forto, pikante la vizaĝon, kvazaŭ per pintoj de fajrigitaj kudriloj. Mi ne povis elteni la atakon: en mia brusto mankis la spiro. Rapide mi reeniris la vagonon. Fine ni ekmovigis antaŭen. Oni sentis klare, kiel nia fera ĉevalo penege daŭras bata1adi kontraŭ la furioza ventego.

La konstantaj loĝantoj de Siberio, kiuj veturis kun ni, rakontis, ke tiaj neĝaj blovadoj okazas en sudaj ĉirkaŭaĵoj de Siberio tre malofte, kaj, ke la lasta ventego memorigis iom pri la norda «purgo».

La tutan nokton ankoraŭ ni trapasis la polviĝintajn stepojn, kie sovaĝaj fortegoj de l'infero ŝajnis festi la forflugon de l'malnova jaro kaj la alvenon de la nova, kiuj ambaŭ sendube per sangaj literoj estos enskribitaj en la estonta historio de l'homaro.

Kuracisto

*Lingvo Internacia*, 1905, p. 53-55; 78-80